

## ĈU UNUIGO AŬ DISPOLVIGO DE LA FORTOJ?

Antaŭ mi kuŝas freŝa informbulteno N<sup>o</sup>1 (januaro 1976) de USEA. Fakte la tuta bulteno estas dediĉita al "Alvoko" al ĉiuj esperantistoj de Ukrainio.

La "Alvoko" komenciĝas per la vortoj: "Por la nuna situacio de E-movado en Sovetio kaj aparte en Ukrainio karaktera estas tre lenta progreso kaj eĉ fakta stagnado. Nur ne multaj junularaj E-klubo funkcias en kadre de SEJM, kaj kelkaj fervoraj unuopuloj izolate plugas la E-kampon en nia lando. Ĉiuj ceteraj esperantistoj malaktivigas kaj pe iomete forfalas el la movado. Ĉi situacio devigas nin serĉi eliron el tiu stato...".

La aŭtoroj de la "Alvoko" bone prilumis la nunan staton de la E-movado en Ukrainio (fakte en la tuta Sovetio la situacio estas pli bona). Sed necesas ne forgesi, ke SEJM-on eniras E-klubo el 7 ukrainiaj landoj, ku el kiuj (Poltava kaj Ĥarkov) laŭ la soc. konkurado lastajara eniris la unuan dekan. Necesas ankaŭ memori, ke en SEJM estis kaj aktivis E-klubo el Strij, Krivoj Rog, Luck, Avdejevka.

La du lastajn jarojn SEJM havas ankaŭ alian formon de kunlaboro de subtenantoj. Ukrainiaj esperantistoj ne preteriris ankaŭ tiun formon. Inter la ĉi jaraj 60(!) subtenantoj estas multaj reprezentantoj de nia respubliko: 2 subtenantaj kluboj kaj 8 unuopuloj. 7 kluboj-anoj kaj 10 subtenantoj - ne tiom terura bildo.

La terureco estas en tio, ke preskaŭ ĉiuj aktivuloj sufiĉe malaktivigas lastatempe. Ni ekmemoru la historion de la E-junulara movado en la respubliko. La unuan fojon (temas, certe, pri la tempo post la II-a mondmilito) E-junularo kolektiĝis en Kievo dum la oktobraj festotagoj de 1966. Tiun renkontigon, kolektintan 49 esperantistojn el 12 lokoj, iniciatis Ĥaroslav Matrijiŝin, Viktor Zaczarnyj kaj Kiril Velkov. Sed pri ia organiziteco dum ĝi ne temis - ĝi estis plene amuza.

Venis la 1969 jaro, kaj en Karpatio okazis la vica 11-a SEJT - forumo de tutsovetia E-junularo. Ĝi sukcesis dank' al klopodoj de la sama Ĥaroslav Matrijiŝin kaj de M. Vaŝĉiŝina el Strij. Tamen ankaŭ tiu forumo ne havis bonan influon al la situacio en Ukrainio.

La 7-8 de novembro 1970-a en Ĥarkov okazis la 2-a renkontiĝo de de ukrainia E-junularo, dum kiu estis fondita UEJM (kadre de SEJM). Malsukcesis ĝi ĉefe pro malaktiveco de la anoj, unuavice de la estraro. Malgraŭ tio dank' al ia laboro de tempo al tempo gvide de UEJM okazadis regulaj E-renkontiĝoj de junularo (Doneck, Poltava...). Poste aperis URSA (Ukrainia Regiono de SEJM-aktiveco), kies Provizora Komitato multe insultis tiun de SEJM, sed evidentiĝis, ke ili mem nenion utilan faris.

Kaj jen aperis nova organizaĵo - USEA: "...En tia situacio la renkontiĝo de ukrainiaj E-aktivuloj, okazinta dum la festotagoj 5-7. 12.1975 en Donecko, iniciatis fondon de la respublika eksterkluba organizaĵo de esperantistoj-aktivuloj - Ukraina Societo de E-Aktivuloj (USEA). Estis formita iniciata grupo sub gvido de A.V. Sakoviĉ (Kiev)...". - (el la "Alvoko").

La leganto povas kompreni, kvazaŭ mi arde elpeŝis kontraŭ tiu iniciato. Ne!!! Mi nur pensas, ĉu ne dispolvigas ni la fortojn? Ĉu ne

pli bone estus aligadi tiujn E-unuopulojn al SEJM kiel subtenantojn? Ankaŭ fondo de diversaj fakoj kadre de USEA - ĉu ne sufiĉas 16 fakoj kaj servoj de SEJM, kiuj bezonegas kunlaborantojn kaj serĉas ilin?

Povas esti, simple ŝanĝiĝas la nomo de la regiona organizaĵo (UEJM-URSA-USEA-?), kaj la laboro restas senŝanĝa?

Se rigardi la "Provizoran Regularon de USEA", en la 10-a punkto oni trovas: "Por informado la Konsilantaro eldonas pli-malpli regulan informbultenon de USEA, dissendatan al la membroj de USEA". Ĉu "Aktuale" ne plene respegulas la E-vivon en Sovetio? Kie mankas en ĝi?

Kiu povas <sup>respondi</sup> ~~respeguli~~ el la amaso de la demandoj?

D.Cibulevskij, unua v/p de SEJM.

### ĈU ESTAS NECESAJ "JNFORMAJ LETEROJ" EN LA RUSA LINGVO?

Ekde 1957 estas eldonataj diversaj informaj materialoj pri Esperanto-Movado en la rusa lingvo. Nun ni ilin titolas "La Informaj Leteroj de gorkijaj esperantistoj", mallonge "LIL". Ili celas preskaŭ la saman kiel "Aktuale", nur "LIL" enhavas materialon ligitan kun konkretaj datoj, t.e. kroniko, jubileaj eventoj, diversaj anoncoj, kalendaroj por internacia korespondado kaj helpmaterialo por gelernantoj kaj konserve de epistola heredaĵo. Aperadis faka materialo en pli ol 200 specialecoj. Generale estis eldonitaj ĉ.5000 artikoloj (1-3pĝ) kaj preskaŭ la sama kvanto da artikoloj estis anoncita en la bibliografia serio, respegulanta enhavon de E-periodaĵoj, ne nur ricevataj de ni mem, sed prezentitaj de fervoraj esperantistoj Gins, Korn, B.Kelker, Sigal, Karev, Rogov. La kvanto da legantoj ne estis kalkulita, tamen "LIL" trafis en ĉ. 600 loĝlokojn.

Niaj legantoj eldiris malkontenton pri tio, ke ni ne havas akordiĝon kun "Aktuale", ne ĝustatempe informas pri okazintaj E-tendaroj kaj ceteraj aranĝoj, kiujn ni pro foresto de la akordiĝo prenas nur el eksterlanda gazetaro. Ĉu niaj informantoj ne povas samtempe kopion de siaj informoj sendi al ni? - certe povas. Sed ili malatentas la vastan kanalon en la rusa lingvo, helpantan al multa ekstera-SEJM-a publiko ne ion ekkeni pri Esperanto, sed eĉ partopreni kaj subteni SEJM-on.

Parton de la "LIL"-laboro prenas je si la "Informa Kolekto" de SEJM, sed ankoraŭ foje necesas substreki, ke ilia laboro rilatas nur al SEJM, cetera publiko nenion konas pri ĝi. Estus bone, se ĝi sendu al ni po unu ekzemplero de kontribuaĵoj por retajpado, kiun ni povus aŭ resendi aŭ adresi laŭ indiko de "IK".

La alvoko estas aperigita tiucele, ke E-eventoj sur la teritorio de Sovetunio povu esti famigitaj pere de "LIL" de gorkijaj E-istoj, pli frue aŭ almenaŭ samtempe kun "Aktuale" aŭ en "Esperantaj Periodaĵoj". Ĝis nun ni uzis ĉefe la lastan fonton, sed tio ne kontentigas niajn legantojn en kelkaj centoj da loĝlokoj de USSR. Tial ni alvokas vin sendi al ni jenajn koncizajn sciigojn:

- 1) pri ĝustaj datoj kaj lokoj de entreprenataj renkontiĝoj;
- 2) pri okazaĵoj kaj eventoj, koncarnantaj la E-Movadon;
- 3) pri organizaĵaj kaj aliaj eventoj ĉe diversaj kampanjoj;
- 4) pri notindaj datoj en loka movado;
- 5) pri laboro kun junularo kaj en lernejoj;
- 6) ĝenerale pri ĝiuj flankoj de esperantista vivo: interamikiĝo, korespondado, interŝanĝo ktp.

De skribu laŭ la adreso:

603115 GORKIJ, Nevzorovoj, 72-7, Kapustin L.G.

L.Kapustin (Gorkij).



KURSO POR KURSGVIDANTOJ

La pasintjara Pedagogia seminario rekomendis organizi en SEJT-18 kurson por kursgvidantoj. Gi povas okazi nur kun ĝies partopreno en la preparado. Do bonvenu pripensi demandojn prilumetajn, por ke oni povu kompili programon de la kurso. Aliflanke estas serĉataj dezirentoj prelegi kiel pri difinita de vi temo, tiel pri temo elektota el la kompilota programo. La kurso, tiom bezonata, povas okazi nur kun via aktiva partopreno, kara leganto. Sen via partopreno ĝi restos surpapera, kaj tiam vi grumblos, ke neniu zorgas pri kursgvidantoj. Do ne hezitu kaj skribu tuj al la estro de la Metodika fako Boris Kolker (450025) Ufa-25, abonkesto 162).

B.Kolker, estro de la Metodika fako.

DENOVE PRI SUPLEMENTO AL LA RUSA-E VORTARO

En "A"-10(25) mi proponis komenci kreadon de suplemento al la rusa-*Esperanta* vortaro de Bokarev. Dume neniu reeĥfis. El tio mi povas konkludi nur, ke tiun laboron dume neniu faras. Sed kial do neniu esprimis deziron kunlabori?

Verŝajne la plimulto eĉ ne scias pri la propono, ĉar ne ĉiuj *E-istoj* en kluboj legas "A"-n. Kaj ceteraj, kiuj legis, opinias, verŝajne, ke tiu laboro estas tro komplika, kaj ili ne taŭgas por ĝi.

Do mi devas klarigi tien iom pli detale. Unue, pri la celo de la laboro mem. Dume niaj *E-istoj* ne disponas iun rusa-*Esperantan* vortaron pli grandan ol tiun de Bokarev, eldonitan en 1966. En perspektivo la *esperantistaro* de nia lando devas krei fakajn kaj ĝeneralajn vortarojn. Certe, tio ne estas laboro por laikoj. Sed ŝajnas al mi, ke dume devas ni, nesciencistoj, komenci tiun laboron. Ĝi estas tre malfacila, teda, senfina. Ĝi postulas multan paciencan kaj multegan tempon. Tial tiun laboron ne kapablas fari unuopuloj. Nur kolektive ni sukcesos ricevi iun rezulton. Sed la unua etape de la laboro ne estas malfacila: ĝin plenumi povas eĉ komencantoj. Oni devas nur skribi por ĉiu vorto aŭ vortkombino en *E-e* ĉiujn rusajn signifojn, donitajn en la *E-rusa* vortaro (1974 j.) sur apartajn slipejojn. Ekzemple, ni prenu:

fakt//о факт; ~ а фактуреский; ~ е фактурески; в самом деле  
Oni devas skribi 4 slipejojn:

- 1) факт факто;
- 2) фактуреский fakta;
- 3) фактурески fakte;
- 4) в самом деле fakte.

La sola postulo estas, ke oni skribu tre atente kaj legeble. Pli detalan instrukcion ĉiu ricevos persone.

La jam komencita laboro montras, ke multaj rusaj vortojn kaj precipe fakterminojn, kiujn ne enhavas la rusa-*E* vortaro, ni povas trovi en la *E-rusa*. Sed praktike trovi ilin ne eblas, se ni ne faros la menciitan laboron...

Do mi atendas respondojn por kunlaboro. Estus dezirinde, ke ankaŭ *esperantistoj*-spertuloj eldiru sian opinion pri tiu problemo, ĉar ankaŭ tiaj estas bezonataj por daŭrigi la laboron poste (prilabori la rezultojn; redakti ktp.).

Skribu al la adreso: 187503 Tiŝvin-3, du vostrebovanijs.

Vladimir Gakalenko (Tiŝvin).

NIA KOMUNA ZORGO

Pasintjare taŝkentanoj entreprenis originalan aferon. Ĝia esenco estis: disvendi malnovajn abonaĵojn kaj la enspezon transdoni al la SEJM-kaso. Laŭdinda iniciato kaj bona ekzemplo! Ja simila aferon oni povas aranĝi en pli vasta skalo. Ekzemple, dum ĝi somera SEJT. Tielma-

niere ni per unu pafu povas trafi kelkajn leperojn: la kluboj liberiĝos parte de siaj superfluaĵoj arkivaĵoj, la tendaranoj por konvena prezo akiras interesajn esperantaĵojn. Krome, variigos la programo de la tendaro, apeŝas nova speco de aktiveco por poentigo. Kaj fine, ni komune plifirmigos la financon staton de SEJM.

Kompreneble, por vendado taŭgas diversaj E-aĵoj, ne nur malnovaj revuoj. En tendara bazareto oni povas eĉ organizi aukcion por plej valoraj kontribuaĵoj. Mi persone donacos por vendi verdstelajn suvenirojn.

Estimataj seĝmanoj, subtenantoj, veteranoj, bonvolu pripensi ĉi proponon. Por ke la afero ne restu memflua, mi aparte turnas min al tiuj klubaj aktivuloj, kiuj respondecas pri petoj kaj proponoj: necesas praktike organizi kolektadon de E-aĵoj kaj liveri ilin al la tendara loko (eble perpoŝte - banderole).

Estus dezirinde, ke sian opinion eldiru mallonge la organizantoj de SEJT-18, spertuloj pri la vendado kaj aliaj kamaradoj.

Aldone: dum tendaroj iuj kluboj organizas loterion, ankaŭ funkcias klubaj kaj privataj butiketoj... Ilin nepre oni devas imposti.

V.Ĉernov (Kaluga).

### TEJO KAJ ĜIAJ AGADSTEROJ

Dum la 31-a IJK de TEJO en u. Fredericia (Danlando), okazinta fine de julio 1975, estis farita reelekto de la TEJO-estraro. La novan estraron de TEJO nun eniras: prezidantino: Claude Mourmont (Francio), vicprezidantoj: Savas Tsiturides (Grekio) kaj Klaus Schubert (FRG), financo kaj eldonaĵoj: Paul Peeraerts (Belgio), ĝenerala sekretario: Brunetto Casini (Italio), sekretario de KER: Ineke Emmelkamp (Nederlando), servoj kaj studenta agado: Angel Todorov (Bulgario), regiona agado: Juan Azcuénaga Vierna (Hispanio), Margarita Najera (Meksikio) kaj Stefan Mac Gill (Nov-Zelando).

La estinta prezidantino de TEJO d-rino Szabó-Felső Floxa (Hungario) estas elektita kiel HONORA PREZIDANTO.

La sekva 32-a IJK de TEJO okazos en la urbo Tesaloniko (Grekio) en julio 1976 antaŭ la 61-a UK.

### La GVIDLINIO de TEJO 1975-1977

La gvidlinio baziĝas sur la rezultoj de la diskutado pri la laborplano de UEA, speciale sur la tria laborplano de UEA, aprobita de la Komitato de UEA en Beogrado 1973. Ĝi kunigas la enhavojn de la lastjaraj rezolucioj kaj deklaroj de TEJO, kaj pro tio rekte daŭrigas la elektitan vojon post la IJK en Tyreso 1969.

#### I.

1. Kiel laŭkontrakte ligitaj, UEA kaj TEJO devas harmoniigi siajn laborplanojn:
  - tiel, ke ne restu en-ombra grava agadkampe,
  - tiel, ke la laboroj estu kunordigitaj.
2. Evidente, TEJO bazas precipe sian laboron je laboro de siaj Landaj Sekcioj; do nepre gravas en la plerumo de la plano la laboro de la diversaj Landaj Sekcioj.
3. Oni distingas por klareco la rolojn de:
  - TEJO-estraro;
  - Specifaj komisionoj de TEJO;
  - Landaj Sekcioj de TEJO kaj ties membroj;
  - Individuaj membroj de TEJO.

#### II. Celoj

1. TEJO klopodas informi kaj atentigi la tutmondan junularon pri la menda lingvo-problemo kaj ties solvo per la Internacia Lingvo Esperanto.



2. TEJO disvastigas kaj propagandas la lingvon Esperanto.
3. TEJO same daŭre observas la sociajn strukturojn, kiuj portas la lingvojn, kaj konscias pri la neceso respekti la Deklaracion de Homaj Rajtoj.
4. TEJO estas internacia organizaĵo, kiu en ĉiuj siaj pozicioj devas resti strikte senpartia, kio tamen ne malhelpas la esprimon de politik-ideologiaj starpunktoj de siaj membroj.
5. TEJO kontraŭstaras ĉiujn sociajn evoluojn kaj eventojn, kiuj endanĝerigas la celojn, nomitajn en la punktoj 1-4, kaj aktive subtenas tiajn, kiuj favoras la Internacian Lingvon Esperanto.

III. Interna agado

Rolo de TEJO-estraro:

- Ĝi daŭrigas la kontakton kun la diversaj Landaĵ Sekcioj, aparte komisionoj kaj laborgrupoj, junularaj delegitoj, individuaj membroj,
- Ĝi daŭre informas pri sia agado kaj laboro TEJO-anojn (per InfonNN, "Esperanto" ka.).

Rolo de Landaĵ Sekcioj de TEJO:

- Ĝi daŭre informas TEJO-estraron (aŭ la koncernajn komisionojn) pri sia agado kaj problemoj,
- Ĝi aparte informas pri listo de siaj membroj,
- Ĝi klopedas varbi novajn (individuajn kaj patronajn) membrojn de TEJO.

1. Varbado

- En tio devas nepre kunlabori TEJO kaj Ĝiaj Landaĵ Sekcioj.
- En ĉiuj organoj informo pri TEJO,
- Organize de sistema varbado dum landaj kaj internaciaj renkontiĝoj,
- ID helpas al varbado.

2. Administrado

- Rilatoj kun UEA kaj CO baziĝas sur la "Projekte pri integriĝo",
- TEJO ellaboru novan Statuton (1975).

3. Edukado

- TEJO organizas seminarion por gvidantoj, kaj kunlige kun tio ĝi prizorgas eldonon de taŭga materialo por informi la gvidantojn,
- Landaĵ Sekcioj okazigas seminariojn por gvidantoj internajn.

4. Servoj

- TEJO revizias la utiligon de la ĝisnunaj servoj kaj studas utiligon je modife aŭ je kreo de novaj servoj.

5. Studoj

- TEJO zorgas preparas temojn de IJK kaj de aliaj renkontiĝoj,
- Landaĵ Sekcioj helpas al la fondigo de studgrupoj por la IJK kaj renkontiĝoj,
- TEJO kaj Landaĵ Sekcioj klopedas fondi konstantajn studgrupojn pri temoj aparte ligitaj al nia agado (aŭ kiuj necesigas la uzon de Esperanto).

IV. Ekstera agado

1. Rilatoj kun Esperantistaj organizaĵoj:

- Daŭra kontaktado kun Esperantistaj junularaj organizaĵoj, reciproka reprezentigo dum la aranĝoj,
- Kunlaboro kun plenkreskaj fakaj organizaĵoj, kies celoj kaj agado koincidas kun la laboro de TEJO, aŭ la kunlaboro estas utiligebla per seminarioj de TEJO.

2. Regiona agado:

La laboron de regiona agado gvidas koncerna estrarano, kiu fondas apartan komisionon, kies membroj agas je konkreta geografie fiksita teritorio.

- RA direktiĝas al la landoj, kie TEJO ne havas Landan Sekcion, serĉas kontaktojn ankaŭ tie, kie la Landa Sekcio ne plu funkcias,
- RA regule kontaktas B-komitatojn de TEJO kaj ID-ojn, kiuj loĝas en la koncernaj landoj,

- RA kontaktas la koncernajn Landajn Asociojn, petante helpon por fondi Landan Sekcion,
- sisteme kolektas adresojn de esperantistoj en landoj, kie ne ekzistas organizita movado; kontaktas kun ili,
- helpas la junajn esperantistoj en senmovadaj landoj.

3. Neesperantistaj organizaĵoj:

La laboron gvidas ~~komitato~~ pri Eksteraj Rilatoj en A

- KRR daŭrigas la kunlaboron kun NEJO-j surbaze de la komencita agadlino laŭ la principoj de Tyresë-deklaracio kaj Toruna Rezolucio sub la kontrolo de la Komitato,
- serĉas kontaktojn kun ekstereŭropaj junularaj organizaĵoj por establi kunlaboron,
- dum la internaciaj junularaj aranĝoj aktive reprezentigas,
- daŭrigas la seminariojn pri lingvaj problemoj,
- aktive partoprenas en la kunlaboro inter UNESKO kaj UEA,
- plustudo de la monda lingva problemoj kaj diskonigo de tiuj ~~studoj~~ <sup>studoj</sup>.

La ĉi-supra gvidlinio estas pridiskutita kaj korektita dum aparta laborrondo en Munster (FRG) kaj poste finpolurita kaj aprobita dum komitatkunsidoj.

D. Gibulevskij, Unua vicprezidanto de SEJM.

SEJT-18: BELARTAJ KONKURSOJ

La Prepara Komitato de la 18-a Sovetia Esperantista Junulara Tendaro anoncas, ke dum SEJT-18 okazos Belartaj Konkursoj, kaj invitas ĉiujn esperantistojn amase subteni la aranĝon?

La konkursojn rajtas partopreni ĉiu esperantisto en aĝo ĝis 40 jaroj. Ĉiujn pliaĝajn esperantistojn ni petas prezenti siajn materialojn eksterkonkurse por plibeligi la konkursojn je spertaj kreitaĵoj kaj por instrui junajn talentulojn. Oni povas partopreni la konkursojn ĉeeste aŭ foreste. La venkontojn atendas belaj memordonacoj.

Por plifaciligi organizon de la konkursoj kaj la laboron de la jurio ni komencas akcepti la konkursaĵojn jam nun. La adreso por sendi la konkursaĵojn estas:

187500 Tihvin Leningr. obl., poŝtamt, ab. ja. 2, Kogamu Aleksandru Borisoviĉu.

I. Literatura konkurso

a) originala prozo:

Partoprenas originalaj prozaj verkoj ne pli ol 3-paĝaj (tajpita teksto). Limdato - la 1-a de junio. La konkursaĵoj, gajnontaj la premiojn, estos publikigitaj.

b) originala poezio:

Partoprenas originalaj versoj aŭ versaroj, ne pli ol 200 linioj sume. Limdato - la 13 de aŭgusto. La konkursaĵoj, gajnontaj la premiojn, estos ~~premi~~ publikigitaj.

c) tradukitaj prozo:

Partoprenas tradukoj de la rakonto " *Уберек хмед* " ("A"-I(28)). La plej bona traduko estos publikigota.

ĉ) tradukita poezio:

Partoprenas tradukitaj versoj aŭ versaroj, ne pli ol 200 linioj sume. Limdato por sendo aŭ enmanigo - la 13-a de aŭgusto.

II. Konkurso de kantoj

Partoprenas kantoj originalaj kaj tradukitaj. Al la teksto nepre aldonu la muziknotojn. Limdato por prezento - la 17-a de aŭgusto. Premiotajn kantojn oni publikigos.

III. Konkurso de fotoj

Partoprenas interesaj fotoj pri E-tendaroj, SEJM-Konferencoj kaj regionaj renkontigoj de esperantistoj, kluba vivo ktp. Sendu fotojn



13x18 cm aŭ pli grandajn. Se iu fotisto ne havas kondiĉojn por fari bonan foton - sendu li la negativon, - la fotojn preparos la organizantoj surloke. (Ĝi-okaze la fotoj estos prezentitaj eksterkonkurse). Ĉiuj bonkvalitaj fotoj partoprenos la tendaran ekspozicion.

Speciala premio por la plej interesa kaj bonkvalita serio de lumbildoj.

Lindato por sendi fotojn kaj negativojn - la 1-a de julio.  
Sejmanoj; Aktive partoprenu la belartajn konkursojn de SEJT.

Organiza Komitato de SEJT-18.

### VOLGO-URALA RENKONTIĜO

"...Kvankam tri tagojn por renkontiĝ' havas ni,  
Gaje veturas la verda vagonar'..."

Volgo-Uralaj renkontiĝoj... Da ili jam estis dek du. Ĉi-jare la 6-8 de marto okazis REVU-13 (diabla dekdu). Ĉu bona, utila ĝi estis aŭ ne?

Rigardu ĝin dekomence de la unua flanko. REVU-13 estis en la urbo de nafto - Tjumeno. Malgraŭ tio, ke en Tjumeno ĝi estis unufoje, la mastroj tre bone organizis ĉiujn aranĝojn. Unue, la mastroj estas tre gastemaj: ili renkontis nin en la flughaveno malgraŭ, ke ni alflugadis nokte. Frumatene ili jam sidis en la hotelo kaj registris la alvenintajn gastojn.

La 6-an okazis solena malfermo de la renkontiĝo. Bonege aspektis la konferenĉalo: portreto de L.Zamenhof, diversaj E-sloganoj ornamis ĝin. Tjumenanaj konatiĝis nin kun sia kluba ĉambro. Krome, estis tre agrable, ke mem la prezidanto de SEJM k-do V.Aroloviĉ vizitis nian renkontiĝon! Kaj la redaktoro de "Aktuale".

Post solena malfermo estis interese organizita "Horo de konatiĝo, dum kiu komencantoj povis interparoli kaj konatiĝi. Bona afero por komencantoj! Agrable kaj gaje trapasis ĉiuj amuzaj aranĝoj: vizito al la drama teatro (post la spektaklo eĉ estis dancoj!), bankedo en la kafejo "Kristall".

La 7-an estis aŭtobusa ekskurso tra la urbo, kiun bonege gvidis A.Kalaŝnikov kaj V.Opletajev (certe, en Esperanto). Kaj la 8-an estis renkontiĝo kun interesaj homoj de la urbo.

Kaj nun pri la plej grava afero de la renkontiĝo - pri la Seminario. Ĝi okazis la 7-an. En la unua parto de la seminario kluboj raportis pri sia laboro, en la dua - estis pridiskuto de la artikolo de M.Bronŝtejn "Skize pri SEJM". Bedaŭrinde dum la seminario parolis nur tre mallarĝa roado de homoj. Se rigardi la protokolon, ni ekvidos sekvajn familinemojn: Aroloviĉ, Ebel, Aroloviĉ denove, Kalaŝnikov... Generale dum regionaj renkontiĝoj tre lamas la lingva nivelo, ĉar multe da komencantoj partoprenas renkontiĝojn (pli ol duono). Dum seminario ili preskaŭ nenion komprenas. Krome, ili ne konas la problemojn, kiujn oni pridiskutas dum la seminario. Ili, malfeliĉuloj, simple turmentigas dum 4 horoj! Neniujn proponojn ili, kompreneble, povas aldoni. Kaj ĝenerale, ĉu dum renkontiĝo ni multe okupiĝas pri komencantoj? Nur dum la horo de konatiĝo (1 horon)! Kaj iomete dum bankedo. Kaj ĉio!

Mi havas proponon organizi REVU sen komencantoj (partoprenu nur aktivaj komencantoj, interesigantaj pri Esperanto, sed ne nur pri amuzoj, veturado ktp.).

Certe, aperos kontraŭdiro: kiamaniere ni kreskigu aktivulojn? Dum interurbaj renkontiĝoj! Por komencantoj tiaj renkontiĝoj estos pli utilaj ol la regionaj, ĉar ni povas elpensi specialan programon nur por ili, por pliaktivigi ilin kaj plialtigi la lingvan nivelon. Interalie, interurbajn renkontiĝojn ni povas organizi aparte en Baŝkirio, en la Ĉelabinska regiono, en la Tjumena regiono ankaŭ en Volga regiono.

Ankoraŭ povas ek esti de mando pri korespondkursanoj. Ni ankaŭ ilin devas inviti ne al REVU, sed komence al interurbaj renkontiĝoj. Do, kiel pensas REVU-anoj, ĉu eble organizi REVU-14 nur por aktivuloj? Se ni organizu REVU nur por aktivuloj estos pli multe da diskutitoj utilaj por la E-movado, konkretaj proponoj. Eble bezonate estas por nia regiono elekti regionan komitaton, kiu antaŭe planus ĉiujn temojn por diskutoj?

Do, la renkontiĝo jam finiĝis. Du sentoj restis post ĝi. La unua - bona pro bonaj renkontiĝoj kun amikoj, pro gastemo de la mastroj. Kaj la dua ne tre bona. - Mi ĝis nun ne povas forĵeti la penson: kion ni faris dum la renkontiĝo por la E-movado? Ni nur ripozis Esperantmaniere.

Mi esperas, ke iu el REVU-anoj reeŝos al tiu ĉi artikolo.

Ankoraŭ iomete pri la statistiko. La renkontiĝon partoprenis 63 personoj el 20 diversaj lokoj de la Volgo-Urala regiono kaj ekster ĝi (Volgograd, Syzranj, Ijevsk, Permĵ, Salavat, Ufa, Birsĵ, Miass, Celabinsk, Barnaul, Moskvo). La plej malproksima loko estis Moskvo, la plej granda grupo venis el Birsĵ (10) homoj.

V. Dobrydina (Miass).

INFORMOJ • PETOJ • ANONCOJ • SCIIGOJ

EK AL KUNLABORO!

La Kanta fako de SEJM aperigos novan kantareton kun melodiaro kaj literumita akordakompamo. Kinjn E-kantojn vi preferus vidi en ĝi? La enhavo de la kantareto plejparte dependos de vi, tial urĝe sciigu viajn opiniojn kaj bondezirojn, sendu viajn proponojn, satajn kantojn (indikinte la aŭtoron, tradukinton, komponiston). Ne forgesu, ke la kunlaboro kun nia fako alportos ankaŭ certan kvanton da poentoj en vian kluban ŝparujon!

Do, skribu, ne prokrastu al: Kanta fako de SEJM: 235800 Litova SSR, Klaipeda, p/k 167.

Dankon!

\* \* \* \* \*

La 15-an de februaro en Vilniaŭa junulara klubo okazis ĵarkunveno. La nova estraro de la klubo: prezidanto - Marite Urbanaviĉiute-Gajdamaviĉiene, sekretariino - Danute Janĉiorajte, financisto - Graĵina Grabeĵite-Oŝkiniene, respondeca pri propagando - Staseo Gajdamaviĉius, respondeca pri renkontiĝoj - V. Bingelis, lingvaj aferoj - Nijole Jambajte. Aliaj respondeculoj estos elektotaj laŭ bezono.

\* \* \* \* \*

TJUMENO

"REVO" ricevis konstantan ejon en la kulturpalaco de fervojistoj. Kunvenoj okazas ĉiudimanche de la 11-a ĝis la 13-a en la ĉambro N-ro 4.



## MATERIALO №7 de la Terminara Centro

## Generalaj rimarkoj por la tradukado de "TW"

1.1. Ĉiu TC-kunlaboranto havu koncernan numeron kaj ĉifru ĉiun slipon: Soskina (Pskov) - №1, Korolev (Bijsk) - №2, Grigorenko (Poltava)-3, Lupickij (Ĥarkov) - 4, Sudareva (Krasnojarsk) - 5, Brik (Rostov-Don) - 6, Šilas (Vilnius) - 7, Vladimircov (Barnaul) - 8, Čaldaev (Barnaul) - 9, Ebel (Barnaul) - 10, Zibenkes (Salavat) - 11, Miŝenko (Doneck) - 13, Kolker (Ufa) - 14, Sokolov (Kolemma) - 15.

1.2. Sur slipo de la unua etapo skribu "nestan" vorton, sed poste konkretan signifon de la kunmetita termino. Ekzemple, skribu ne W a l m d a e h, sed:

	1-95	
Dach		valm-tegmento (TW)
Walm-		(ER)-
Вальмовая крыша		
четырёхскатная		
(шатровая) крыша (DR)		

Tio ĉi necesas por trovi dum redaktado la terminon en (TW). Oni devas serĉi la literon D sed ne W. Sammaniere skribu rusajn terminojn kiel en rusa-naciaj vortaroj.

Se rusa aŭ germana termino havas sinonimojn, skribu ĉiujn terminojn sur apartan slipon kaj en citiloj skribu la duan signifon de la termino.

	1-96-1	
Крыша		valm-tegmento (TW)
вальмовая		(RE)-

	1-97-2	
Крыша		valm-tegmento (TW)
четырёхскатная		(RE)-
(шатровая)		

	1-98-3	
Крыша		valm-tegmento (TW)
шатровая		(RE)-
(четырёхскатная)		

Ĉi-tie:

- 1 - konstanta numero de TC-kunlaboranto;
- 95, 96 - indikoj de slipoj de la unua etapo;
- 1, 2, 3 - la indikoj de slipoj de la dua etapo.

1.3. Indiku en via letero, kiun vortaron vi uzas en la laboro. Prefere uzu: *Немецко-русский политехнический словарь. Изд-во "Сов. Энциклопедия", М. 1973.*

1.4. La slipojn faru el maldika papero, skribu sur ili preslitere, sendu ilin po nemulte en ordinaraj kovertoj.

1.5. Skribu viajn rimarkojn, dubojn ktp. ruslingve en citiloj per krajono, ĉar tiam oni povas kompreni, ke tio ĉi estas ĝuste via propono, opinio pri koncerna termino.

1.6. Neniam forgesu la indikojn (RE) aŭ (ER), alieokaze oni povas kompreni, ke vi ne kontrolis la traduken de termino.

1.7. Se kunmetita termino forestas en (DR), - traduku ĉiun radikon de la termino kaj skribu la tradukojn sen ŝanĝo. Vian proponatan tradukon skribu malsupre:

1-1000  
 Flachziegeldach ebentegola tegmento (TW) (ER)-  
 (DR)-  
 DR: flach - плоский  
 Ziegeldach - черепичная кровля  
 кровля из плоской черепицы (?)  
 Плоская черепичная кровля (?)

A.Kogan, estro de la Terminara Centro.

#### E-MURGAZETO POR SCIENCAJ APLIKOJ

Ekde oktobro 1975 en la Geografia <sup>socio</sup> ~~societo~~ de la Akademio de Sciencoj de USSR funkcias E-rondeto sub patronado de D-ro pri geografio prof. D.L.Armand. La rondeton gvidas k-dato pri kemio B.V.Tokarev, vizitas ĉ. 20 h., plejparte studentoj de la geografia fakultato de MSU kaj pedagogia instituto je la nomo de Lenin.

Enkadre de la rondeto oni aperigas ĉiunonatan murgazeton, la ĉefa temo de kiu estas: Esperanto en la scienco. Aperis jam tri numeroj: Esperanto en geografio kaj turismo - N<sup>o</sup>1, Esperanto en la scienco - N<sup>o</sup>2, Zamenhof - aŭtoro de Esperanto - N<sup>o</sup>3. Estas planate de la sekva studjaro duonon de la gazeto dediĉi al ĝeneralaj problemoj de Esperanto en la scienco, la alian parton al aplikado de E-to en la geografio. Referado (ruslingve) de sciencaj verkaĵoj en E-to ankaŭ estas unu el la ĉefaj taskoj de la gazeto.

Post demonstro de la murgazeto en la Geografia socio ĝi pendos laŭvice en MSU, pedagogia instituto, Lingvosciencia instituto de la Scienca Akademio de USSR kaj, eble, en aliaj.

Ĉiujn interesitojn ni invitas kunlabori. Bonvena estas ankaŭ interŝanĝo de materialoj kun similaj murgazetoj.

L.Medvedev, redaktanto de la gazeto (143013  
 Moskva, stancija Nemĉinovka, ul. Borodinskaja 7).

#### ENHAVO DE "SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ" (suplemento) (Suplemento al "Budapeŝta Informilo" jul. 1975)

1. Pri la aperigo de la Sciencaj Komunikaĵoj.
  2. Lingvo, stilo, ortografio en la Sciencaj Komunikaĵoj.
  3. Celhave kaj sisteme. Tria jaro de Sciencaj Vesperoj en la Budapeŝta grupo Konkordo.
  4. D-r György Ferencz: La internacia krime.
  5. Rekomendita literaturo por fakuloj, verkantaj en Esperanto.
  6. D-r János Székely C.Sc.: Kriminalistike kaj kriminologio.
  7. Ada Csizsár: Pri la Esperanta frazeologio.
  8. D-r Ilona Bikszádi: Novnaskitaĝa distresa sindromo.
  9. D-r Éva Stancz: Ĉiutagaj taskoj de la distrikta infankuracisto.
  10. D-r Lajos Molnár: Iom oftaj ekzantemaj malsanoj en la infanaĝo.
  11. D-ro Julianna Farkas: Malsanoj de la konjunktivo.
  12. Plenumita trijara programo de la Sciencaj Vesperoj en la klube Konkordo.
  13. D-r Flórianné CZAKÓ: Preĝigo kaj apliko de la infuziaj solvaĵoj.
  14. D-r Béla Mészáros C.Sc.: Celkariologio-nova branĉo de biologio.
  15. Pál Fabulya: Entomologio - scienco pri insektoj.
  16. Dr. Ilona Gál C;Sc: Antimikroba efikaj substancoj en niaj nutraĵoj.
  17. D-r Ottó Haszpra D.Sc.: Modeleksperimentoj kiel modernaj helpiloj de la hidroteknika planado.
  18. Ing. Imre Zoltán: Informatike kaj publikaj rilatoj.
  19. D-r Endre Dudich: Pri la fakrevuo "Geologie Internacia".
  20. Ing. Károly Nagy: Fundamentoj de metalurgio.
  21. D-ro Árpád Máthé: Nuntempa evelue de la plastoproduktado.
  22. Pri la "Senĝenaj dialogoj" de Alberto Fernández.
  23. "Pri la varmo" de Miroslav Tuma aperis libroferme.
- Fotokopioj riceveblaj ĉe: A.Kogan 187500 Tiflvin Lenigr. obl., ab/je 2.